Ullenborth

# BULTENO
DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 2 · Marto/Aprilo 1961

# La vojaĝagentejoj en Germanio

Certe tiu aŭ tiu demandos, kial en nia fakorgano aperas artikolo pri temo ŝajne sen rilato al la fervojo. Supozeble oni ja scias, ke la vojaĝagentejoj eldonas fervojajn biletojn, sed ĝenerale, laŭopinie de multaj fervojistoj, la vojaĝagentejoj estas taksataj kiel konkurentreprenoj vid-al-vide de la fervojo. Efektive la situacio estas alia.

Jam en la antikva tempo, dum la unuaj tri aŭ kvar jarcentoj post Kristo, estas konstatebla speco da agentejoj en la mediteranea teritorio. Ili servis al la tiutempe ebla kaj kutima turismo de altranguloj kaj komercistoj. Sed nur fine de la 15a jarcento, kiam komenciĝis la pilgrima vojaĝado al la Sankta Lando, evoluis en la havenurboj Venezia kaj Marseille profesiaj agentejoj. Tiuj peris la tranoktadon en la urboj kaj rezervigis lokojn sur la velŝipoj. Temis do pri karavanaj vojaĝoj je fiksa prezo.

Kontraste al la evoluo en aliaj landoj, en Germanio la situacio relative stagnis. Certe, jam ekzistis apartaj agentejoj de la ŝiplinioj. La Prusaj Ŝtatfervojoj posedis kvar agentejojn. Funkciis jam la nuntempe ankoraŭ ekzistanta Oficiala Bavara Vojaĝagentejo (germanlingva mallongigo ABR) en München kaj la Virtemberga Vojaĝa kaj Trafika Oficejo (germanlingva mallongigo WRV) en Stuttgart. La mondfama angla vojaĝagentejo Thos. Cook & Son ankoraŭ ekzistanta jam havis filion en Germanio samkiel la usona agentejo American Express Company, kiu post la dua mondmilito akiris gravan pozicion.

Tiuj agentejoj komune sin okupis ĉefe pri la internacia trafiko, ĉar turismo en la nuntempa senco ankoraŭ ne ekzistis. La nombro de personoj, kiuj povis ĝui tian ekskluzivan turistikon perfervoje aŭ perŝipe, estis relative malgranda. La agentejoj en München kaj Stuttgart rajtis vendi fervojajn biletojn, sed la vojaĝontoj devis pagi apartan pluspagon. Tiu apenaŭ kontentiga situacio evidente ŝanĝiĝis, kiam en la jaro 1917 la germana registaro fondis la Germanan Vojaĝagentejon (germanlingva mallongigo DER) kunligante kelkajn kompaniojn. Tiu entrepreno kun siaj filioj ricevis por en- kaj eksterlando la permeson vendi je oficiala prezo biletojn, kuponojn kaj biletojn por litoj kaj sidlokoj. La sukcesplena evoluo baldaŭ kondukis al la partopreno de la Reĝaj Hungaraj Ŝtatfervojoj, de la hungara turisma agentejo IBUSZ kaj de la Aŭstra Trafikoficejo. La nomo ŝanĝiĝis en Mezeŭropa Vojaĝagentejo (germanlingva mallongigo MER). Ĝi sin dediĉis prefere al la vendado de fervojaj biletoj. Poste aliĝis la eldono de porŝipaj kaj porflugaj biletoj. La organizo MER mem havis filiojn nur en Berlin, Köln, Frankfurt (M) kaj Heidelberg. La jam menciita agentejo ABR en München transprenis la ĝeneralan reprezentadon por Bavario, dume la agentejo WRV en Stuttgart transprenis ĝin por Virtembergo. Multaj ŝipagentejoj de la kompanioj Hapag kaj Lloyd estis komisiataj por la servo de MER.

Post preskaŭ tridekjara agado la rajtoj pri la biletvendado estas forprenitaj en 1946 per decido de la tiama kontrolkonsilantaro. La organizo MER estas devigita ŝanĝi sian ĝisnunan nomon en Germana Vojaĝagentejo (DER).

Nuntempe la organizo DER estas komisiito de la Germana Federacia Fervojo kaj ĝenerala reprezentanto de pli ol 30 eŭropaj fervojaj administracioj kaj de aliaj trafikentreprenoj. DER posedas 1050 agentejojn, el kiuj 642 estas en eksterlando. Krom tiuj ekzistas multaj filioj de la konataj vojaĝagentejoj Cook/Wagon-Lits kaj American Express. Ili ĉiuj sin dediĉas al la porpasaĝera servo en la intereso de la germana kaj eksterlandaj fervojoj, al kio ili estas devigitaj laŭkontrakte. Ilia gajno konsistas el procentaĵo fiksita laŭ la speco de la bileto kaj de la koncerna administracio. La agentejoj sin okupas ankaŭ pri la vendado de ŝipaj kaj flugaj biletoj, aranĝas aŭ peras t. n.

# El la bilanco 1960

## de la Germana Federacia Fervojo

Bilanca valoro de la fervojo: 34 000 000 000 gmk.
Dumtempa valoro de la fervojo: 17 000 000 000 gmk.
Relara retaro: 31 000 km.
Akcelveturiloj: 11 800 (lokomotivoj, motorvagonoj ktp).
Paŝaĝervagonoj: 21 000.
Ŝarĝvagonoj: 300 000.
Transportitaj pasaĝeroj: 1 500 000 000.
Transportitaj frajtaĵoj: 305 000 000 tunoj. Tiu sumo konformas al 55% de la frajtaĵoj transportitaj perfervoje, perŝipe kaj peraŭtomobile.

El „Bundesbahn-Mitteilungen" n-ro 6/1961 de W. B.

# „Rulvojo" sur reloj

Por deŝarĝi la ĉiutage kreskantan frekventecon de la granddistancaj stratoj en Germanio, ekstaris la nova ideo de „rulvojo" sur reloj de larĝeco de 3—4 m. Oni projektas transporti aŭtomobilojn por personoj kaj ŝarĝoj inkluzive la ŝoforojn kun rapideco de 200—250 km senhalte inter stacioj situantaj 100—150 km. La Federacia Trafikministerio komisiis la kompanion „Intertraffic" en Düsseldorf pri la faka esploro de tiu projekto. Laŭ tio la kostoj por la rulvojo kun propra trako de 200 km estos proksimume 5 miliardoj de germanaj markoj. La trajnoj devus esti akcelotaj sur kurentohavantaj reloj sen superrela elektrika filaro. (Laŭ „Das Flügelrad" n-ro 3/1961 de W. B.)

## Prospekto pri Westerland (Sylt)

Pri la mondfama germana kuracloko Westerland sur la nordmara insulo Sylt instruas vin 16-paĝa belega prospekto kun multaj allogaj kolorfotoj (germanlingva kun aldona folio en Esperanto). Petu la prospekton de la eldonito: Städtische Kurverwaltung Westerland/Sylt im Fremdenverkehrsverband Nordmark.

### La vojaĝagentejoj ...

turnusvojaĝojn, kaj laboras por aliaj entreprenoj sur la trafika sektoro.

Kontraŭe al la ŝipaj kaj flugaj kompanioj la fervojoj en Germanio ne havas proprajn agentejojn. La reprezentejoj de la Germana Federacia Fervojo en Eŭropo donas informojn kaj konsilojn. Sole la reprezentejo en New York vendas ankaŭ internajn kaj internaciajn biletojn.

W. Barnickel

## Esperanto-ekzameno

La 19an de marto 1961 sukcesis ĉe la „Ekzamenkomisiono Wiesbaden" en la „Ekzameno por kursgvidantoj" la s-anoj Otto Denk, Offenbach, Daniel Jäger kaj Dr. Wilhelm Lang, Frankfurt (M).

Kurt Schönrich, komisionestro GEFA kore gratulas kaj deziras plenan sukceson en la praktika laboro kiel kursgvidantoj.

## Nova subsekciestro

La taskon de la subsekciestro de la distrikto Köln transprenis: BS Wilfried Mester, Bf Rheydt Geneicken, deĵortelefono 943/882/122.

## Feriosemajno

La fervojista Esperantista Rondo en Zwolle, Nederlando, invitas vin, multnombre partopreni en ĝia internacia feriosemajno, okazonta la 2.—9. sept. 1961. Prezo: 70 guldenojn por la tuta semajno, ĉio enkalkulita.

Skribu al la sekretario de la grupo: W. Geldermann, Barentszstr. 70, Zwolle, Nederlando.

## Kampadejo „D-ro Zamenhof" en Francujo

La urbestraro de Vallon Pont d'Arc apud la rivero Ardèche, Francujo, decidis unuanime, doni al la tiea publika kampadejo la nomon „D-ro Zamenhof".

La inaŭgurado okazos dum „Esperantista Renkontiĝo Tutsemajna" (22.—30. 7. 1961).

Sendu gratul-leteron al la urbestro s-ro Henri Ageron, Vallon Pont d'Arc (Ardèche), Francujo.

Pri programo kaj aliĝo petu pliajn informojn (aldonante al via letero internacian respondkuponon) de Groupe Esperantiste du Vivarais, Chemin de Baza, Aubenas (Ardeche), Francujo.

## Duobla evento en London

Dum tri tagoj (2.—4. 8. 1961) antaŭ la 46a Universala Kongreso en Harrogate, London estos la centro de du paralelaj Esperantistaj kunvenoj, nome „Oficiala Antaŭkongreso 1961" kaj „Seminario Oriento-Okcidento". Ambaŭ aranĝoj ĝuas la aŭspicion de UEA. La fundamenta principo de la antaŭkongresa programo estas distro kaj libereco, tiu de la seminario estas, esplori la problemon en urbo, kie troviĝas netakseble riĉaj kolektoj da orientaj kaj afrikaj artaĵoj kaj kie loĝas centmiloj da azianoj kaj afrikanoj. Aliĝantojn atendos rezervitaj litoj en komfortaj hoteloj en la kvartalo de la universitato. La kvanto estas limigita. Tial ne hezitu aliĝi frue.

Pliaj informoj estas haveblaj de Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, London, N. 5.

# Geografa semajno

La Internacia Geografa Asocio (Faka Asocio de Universala Esperanto-Asocio) invitas fakulojn kaj nefakulojn partopreni en la III-a Geografa Semajno, okazonta ĉe Gilbert Murry Hall, Universitato de Leicester, Anglujo, de la 12a ĝis la 19a de aŭgusto 1961 sub la gvidado de Lic. Tibor Sekelj, Prezidanto kaj fondinto de IGA.

Oni prezentos riĉan programon de prelegoj kun lumbildoj, filmoj, sonbendoj pri geografio, antropologio, folkloro, arkeologio ktp. Prelegontoj estos esperantistaj spertuloj el diversaj landoj. Oni antaŭvidas ankaŭ amuzvesperon, gastvesperon kaj ekskursojn al Corby, Coventry, Stratford-on-Avon kaj la graflandoj Derbyshire kaj Nottinghamshire.

La loĝejo, Gilbert Murry Hall en Leicester, estas universitata studenta loĝejo, tre komforta. La inkluziva kosto por loĝado, manĝaĵoj kaj ekskursoj estos nur 10 anglaj pundoj aŭ 400 steloj. Por ne-membroj pluspago de 16 steloj.

Interesuloj bonvolu deklari sian aliĝon tuj al la organizanto D-ro R. H. Osborne, Vic-prezidanto de IGA kaj Docento pri Geografio en la Universitato Nottingham, sub la adreso D-ro R. H. Osborne, Department of Geography, The University, Nottingham, Anglujo. Samtempe bonvolu sendi la antaŭpagon de 2 anglaj pundoj aŭ 80 steloj al lia persona bank-konto „P. O. 32“, ĉe C. W. S. Bank/2, St. Peters Gate, Nottingham, Anglujo.

„Ĉiu membro altiru dum unu jaro minimume unu novan membron!“

(Vortoj el la jarraporto 1960 de nia prezidanto. Ĉu vi ne forgesis ĉi-tiun simplan kaj logikan recepton, por pligrandigi la membronombron de GEFA? Ĉu vi jam agis laŭ tio?)

## *Internacia Esperanto-Feriosemajno*

**Wien 11. 6.—17. 6. 1961 dum la Wienaj Jubileaj Festsemajnoj.**

Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista, Wien, invitas al la supre nomita feriosemajno. Restadejo: Hotel-Café Central Perchtoldsdorf b. Wien, Marktplatz 17. Perchtoldsdorf estas idilia vilaĝo ĉe la rando de la Wiena Arbaro kun du someraj kaj unu kuraca (pinopingla) banejoj. Riĉa interesa programo, i. a. vizito al Spanische Hofreitschule, Wiener Hofburg, Internacia Esp.-Muzeo, kasteloj Belvedere kaj Schönbrunn, amuzĝardeno Prater, tipa vintrinkejo Heuriger. Prezo: 730 aŭstriaj ŝilingoj por loĝejo, tri manĝaĵoj dum tago, aŭtobuso ktp. Templimo por aliĝi: 14. 5. 61. Antaŭpago: 150 aŭstriaj ŝilingoj, ne repagendaj, se oni poste ne partoprenas. Organiza adreso: AFEF, Wien, Postamt 76, Schließfach 117. Bankkonto: Österr. Credit-Institut A. G., Wien I., Herrengasse 12, Konto 15063.

### Alvoko

**La franca grupo de esperantistaj edukistoj (G. E. E.)** deziras trovi personojn kiuj konsentus gastigi, kun aŭ sen pago, francajn geinstruistojn kaj ties lernantojn, kun aŭ sen reciproka gastigado. Bonvolu, interesitoj, sendi sciigojn pri vi kaj viaj deziroj al: F-ino **Cosson,** 4 Rue G. Bizet, **Merignac** (Gironde).

# Novaj elsendotempoj

**de la Esperanto-programo en la svisa radio**

La tradicia horaro de la Esperantaj elsendoj en la svisa mallongonda radio estas anstataŭata per novaj tempoj. Ekde la 8a de majo 1961 la elsendo de d-ro Arthur Baur okazos lunde je 13.20 kaj ĵaŭde je 22.15; la elsendo de prof. Edmond Privat okazos merkrede je 13.20 kaj sabate je 22.15 mezeŭropa tempo. La ondoj estas: 48,66, 31,46 metroj, kaj tagmeze 13,94, kaj vespere 25,61 metroj. La novaj tempoj ebligos al personoj, kiuj ĝis nun eble ne havis tempon je la fiksitaj horoj, aŭskulti la svisan Esperanto-programon.

Bonvolu skribi pri viaj spertoj, kritikoj kaj deziroj al

Svisa Kurtonda Radio
Esperanto-fako
Neuengasse 23, Bern, Svislando.

**Ĉu sendaĵoj en Esperanto . . . ?**

La Internacia Akademio pri Turismo, Monte Carlo, 2, Boulevard des Moulins, aranĝas ĉiujare interesan konkurson pri temo el la turismo. La ĉi-jara temo estis „Kiamaniere oni povas instigi la turistojn, ke ili gajnas vojaĝante pli bonan scipovon pri popoloj kaj landoj?“ La uzata lingvo estas laŭvola, sed ne estas konate, ĉu sendaĵoj en Esperanto ankaŭ estus allasataj.

W. B.

# EL LA GRUPOJ

**Elze/Han.** La 21an de marto 1961 nia malgranda societo aranĝis prelegvesperon kun kolorlumbildoj pri la temo „Vojaĝo al la Bretagne". Venis nia afabla amiko, la instruisto Müller el Hannover kun sia edzino, por partoprenigi nin en la interesege kaj mirige bela vojaĝo tra la tri landoj Nederlando, Belgio kaj Francio. Ni veturis kun ili al Utrecht, Gent, Brugge kaj tra la urboj kaj vilaĝoj de la Normandie kaj Bretagne. Ni vidis la marbordojn de la Atlantiko kaj la malalttegmentajn domojn de la fiŝistoj same kiel la malabundan vegetacion de la paŝtejoj kaj herbejoj kaj ankaŭ la ĉarmajn montetarojn de tiu al ni ĝis nun nekonata pejzaĝo. Ĉeestis krom la membroj ankaŭ diversaj gastoj el la urbo, kiuj tre miris, kiam s-ano Müller ne nur, kiel kutime faras ĉiuj raportantoj, parolis pri la vidindaĵoj, sed krome menciis la valoregan helpadon de siaj Esperanto-amikoj en ĉiuj tri landoj. Per mallonga konversacio s-anoj Müller kaj Giessner post la prelego praktike prezentis nian lingvon al la gastoj ĝis nun neniam aŭskultintaj ĝin.

Cetere nia grupeto daŭrigas sian ĉivintran kurson por komencantoj kaj antaŭvideble partoprenos 2 aŭ 3 el ili en la aŭtuna ferio-semajno en Zwolle. Krom tio 4 membroj veturos al la IFEF-kongreso en Barcelona, el kiuj 3 la unuan fojon. Giessner.

**Hannover.** La 3. 12. 1960 kune kun la loka grupo de GEA ni aranĝis en la junulardomo Hannover-Linden nian Zamenhof-feston. S-ano Müller salutis ĉiujn kaj speciale nian prezidanton s-ano Giessner. Poste oni aŭdis poemojn kaj pianludojn. Grupo el Göttingen prezentis „Esperanto-Ekzamenon" kaj la junulargrupo de Hannover ludis kiel „premiero" la komedion „La fornotubo de familio Smirman", verkitan de s-ano Michling, Göttingen. Granda aplaŭdo dankis la aktorojn. Post la prezentadoj oni dancis.

Nia kurso por komencantoj daŭrigos. Por Barcelona ĝis nun aliĝis 5 personoj. Ulrich

**Soltau/Han.** Nia grupo nun ekzistas 5 jarojn. Dum tiu tempo la nombro de la membroj ne stagnis. Komence ni havis 9 kaj nun 12 membrojn. Ne estas multaj membroj. Sed komparante nin kun pli grandaj urboj ni povas esti tre fieraj. Ĉiujare ni aranĝas varbekspozicion en la hejmo de BSW. Bedaŭrinde la fervojistoj ne montras intereson por Esperanto. Sed ĉar niaj ekspozicioj ĉiam estas publikaj, ni tamen gajnis interesulojn, kiuj poste fariĝis membroj de la loka grupo. La kunlaboro kun la loka grupo estas tre bone kaj ankaŭ facile, ĉar la ĉefparto de la anoj estas fervojistoj.

Post la lasta ekspozicio ni denove komencis kurson kun la interesuloj. Anoncis 6 partoprenantoj, inter ili ankaŭ instruisto. La kursanoj lernis tre diligente. Tial ni jam nun povas fini la kurson. Restis ankoraŭ 4 partoprenantoj, kiuj sin anoncis por la progresinta kurso. Ili ankaŭ aliĝis al la loka grupo.

Dum decembro S-ro Pape invitis al lumbildvespero. Li montris belegajn diapositivojn de la vojaĝo al Finnlando, kie li kaj S-ro Heimlich partoprenis en la internacia fervojista kongreso. La vizitantoj de la vespero ĝojis vidi tiujn diapositivojn. Al la partoprenantoj de la kongreso ili vekis memorojn pri la belaj tagoj en Finnlando.

Dum majo la grupo ricevos viziton de finna amiko. Estos tre bona afero por niaj komencantoj, ĉar ili tiam jam povos provi kion ili lernis. Werner Heimlich

**Weiden.** Nia komencantkurso finiĝos dum la lastaj tagoj de aprilo. Tre ĝojiga fakto estas, ke pli ol la duono de la gekursanoj jam aliĝis al la IFEF-kongreso en Barcelona. Por ĉi tiuj novaj ges-anoj la renkontiĝo kun Esperantistoj el multaj eŭropaj landoj certe estos granda travivajo. Ili volas tie provi siajn kapablecojn, interkompreniĝi kun la granda familio esperantista.

Antaŭ nia vojaĝo al Barcelona ni aranĝos grupvesperon kun lumbildprelego pri Barcelona kaj ĉirkaŭaĵo, farita de nia hispana s-ano Josefo Cunjak, kiu regule restas en nia mezo, kaj du grupanoj, kiuj jam vizitis pasintan jaron la hispanan kongresurbon. El nia grupo tutcerte kongresos dek membroj.

Kun Issy-les-Moulineaux, la franca ĝemeliĝurbo de Weiden, nia grupo volas, pere de Esperanto, helpi pligrandigi la jam ek de kelkaj jaroj ekzistantajn rilatojn. Bedaŭrinde staras la ĉi-tieaj gazetoj kaj la urbestraro inkluzive de la lernejorganoj ankoraŭ seninteresite, eĉ mokante kontraŭ niaj klopodoj. Sed ni volas pruvi al ĉi tiuj supersaĝuloj, ke Esperanto estas pli bona interkomprenilo ol la malmultaj vortoj francaj, eble lernitaj antaŭ jaroj en la lernejo. Simile ni volas fari koncerne al nia itala ĝemeliĝurbo Marchassa. R. König

# Kiam kaj kien

**veturos ĉi-jare la GEFA-anoj ? —**

**Printempe al Barcelona, Hispanio, al la 13a IFEF-kongreso!**

**Autune al Heidelberg, Germanio, al la 5a GEFA-jarkunveno!**

Redakcio: Gerhard Korth, Mainz, Josefsstr. 8. Deĵoradreso: BOI Korth, BUVB Rentenstelle Frankfurt (Main), Kaiserstr. 48 — telefono 955/1164. Manuskriptojn bv. skribi per skribmaŝino (nur sur unu paĝo de la folio, distanco inter la linioj estu 1½). Al tradukaĵoj nepre aldonu la originalan tekston. Sendlimo 15. I., III., V., VIII., X.
Preso: Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn